




Nigro 'kojnumu' profitante de manko da spirpunktoj de blanka ŝtonaro.




Diag. 1 (Mirinda lim-aranĝo ek de N1) La unua meto estu N1 'kojnumi'. Ĉu vi trovis ĝin?



Diag. 2 Blanko respondas per B2, kaj kontraŭ N3,...




Diag. 3 'sinligas' per B4. Sekve, kontraŭ N5 'forkapti', respondas per B6.




Diag. 4 Rezultas ĉi tiu formo. Restas lim-aranĝo, 'sinligi' sur punkton 'a', sed Nigro preterlasu ĝin kaj trans-iru aliloken. Anstataŭ B4 en diagramo 3,...


{paĝo 318 de la originalo}




Diag. 5 Eblas por Blanko 'sinligi' maldekstren per B1. Kontraŭ N2 'forkapti', Blanko 'blokas' per B3, kaj ne diferencas.



Diag. 6 Kontraŭ N1, tro senkonsidere estas 'bari' per B2. Nigro tranĉas per N3, antaŭvidante 'duoblan minacon' N-a, kaj Blanko havas nenian rimedon.




Diag. 7 Se Blanko respondas per B4, Nigro 'sin-etendas' per N5, kaj ankaŭ Blanko devas 'sin-etendi' per B6. Kaj,...




Diag. 8 ('Alterne-kaptado kun unuflanka ŝarĝo al Blanko') Nigro per kutima 'esenca meto', 'sin-ĵeti' per N7 kaj N9 faras 'alterne-kaptadon'. Blanko perdos multon.

Anstataŭ N3 en diagramo 6, eblas aliflanke 'tranĉi' per N-b. Tamen, alimaniere,...(Vidu la sekvan diagramon.)


{paĝo 319 de la originalo}



Diag. 9 (Nigra fuŝo) banale estas 'minaci kaj minaci' per N1 kaj N3. Blanko forkaptas per B2 kaj B4. Kontraŭ N5, Blanko blokas per B6 kaj kaptas tute.




Diag. 10 Alia rimedo de Blanko. Kontraŭ N1, 'sinligas' per B2, kaj kontraŭ 'minaci' per N3, ree 'sinligas' per B4. Nigro kion faru?



Diag. 11 De N5 kaj B6, ĉi kaze Nigro sukcesas per N7 kaj N9 'minaci kaj minaci'. Kiam Blanko 'sinligas' per B10, Nigro povas detruigi la blankan teritorion per N11. (Kontraŭ B-a, Nigro ŝtonmetos N-b.)


Cetere, kontraŭ N3 en diagramo 10,...




Diag. 12 (Kia estas B4?) 'rekt-anguliĝi' B4 ŝajnas esti bona ideo.

Per ĉi tiu meto...


{paĝo 320 de la originalo}




Diag. 13 Blanko intencas preterlasi N5 'forkapton'. (Se Blanko respondus per B-a, la formo fariĝas sama al ĝusta kurso en diagramo 4.)




Diag. 14 (B6 estas aliloken ŝtonmetita.) Tamen, se Blanko preterlasis N5, Nigro povas lim-aranĝi per N7 kaj Blanko malgajnas multe. (Blanko ŝtonmetas B6 sur punkton 'a' en diagramo 1; 'sinligi' en Supra rando.)



Diag. 15 Se Blanko 'tranĉas' per B8, Nigro ŝtonmetas N9 kaj N11, kaj Blanko perdos multon.




Diag. 16 Blanko devas respondi de malsupre per B8. Sekve Nigro sturmas per N9 kaj N11. Ĉi tiam Blanko ne havas alian rimedon ol 'sinligi' per B-a.
{paĝo 321 de la originalo}




Diag. 17 Kontraŭ 'sinligi' per B12, ankaŭ Nigro 'sinligas' per N13, kaj procedas ĝis B16. Eĉ se Blanko ŝtonmetis 'sinligi' en Supra rando, estas pli malgajne por Blanko, invadite tiom multe en MalSupra rando.


Fine, "lim-aranĝi gajnante plej multe sed perdante metrajton", skribita ĉe la diagramo de la problemo...



Diag. 18 estas N1 kaj N3, 'tranĉoj'.



Diag. 19 Procedas de B4 ĝis N7. Ĉi tiam Blanko trans-iras al 'sinligi' en Supra rando. Poste,...



Diag. 20 (Nigro rajtas procedigi ĉi tion.) Nigro povas 'metrajton-tenante' ŝtonmeti N1, N3, kaj N5 (se Blanko preterlasus N5, procedus N-a, B-b, kaj N6), tamen en ĉi tiu ludo, ĉi tiu kurso ne estas gajnema.

Alie, se ne gravus metrajton, la plej bona estus la kurso en diagramoj 18 kaj 19. La

'koinumo' en ĝusta kurso estas arto por 'teni metrajton'.

{paĝo 322 de la originalo}

Ĉiukaze, estas tiel multe da varioj ĉi tie, ke ne eblas prezenti ĉion. Bonvole vi legantoj mem esploru.